# vertikale

Dumonata
periodaĵo
por la aktivuloj
de FEL

Numero 9-10
Junio-Aŭgusto 1995



## Enkonduko

Finfine tamen aperas denove *Vertikale*. Iom malfrue, konsentite, sed ĝi ja estas pli dika "duobla" numero. Ĝia malfruiĝo estas unue pro teknika problemo, due ĉar mi transloĝiĝis, kaj trie ankaŭ la feria vetero ludis rolon. Do, mi petas senkulpigon. Krome, antaŭ ne longe mi estis senlaborulo kaj disponis pri multe da libera tempo, kiun mi plejofte dediĉis al Esperanto. Nun mi - feliĉe - denove eklaboras, sed tio signifas, ke mi povas disponigi malpli da tempo al Esperanto ol antaŭe. Bedaŭrinde, sed tiel estas. Tamen, mi emas plu redaktadi por *Vertikale* kaj ŝatas kiel kutime ricevi leterojn, petojn, demandojn, informojn ...

Cor van Ekelenburg.

**Flandra Esperanto-Ligo**

**Estraro:**

| | |
|---|---|
| Prezidanto: | *Ivo Durwael* |
| Vicprezidanto: | *Wim De Smet* |
| Sekretario: | *Johan Van Eenoo* |
| Vicsekretario: | *Marc Cuffez* |
| Kasisto: | *Flory Witdoeckt* |
| Anoj: | *Henny De Ketelaere* |
| | *Jef Geraerts* |
| | *Walter Vandekieboom* |

**Oficejo**
La oficejo de FEL troviĝas en Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen. Ĝi estas malferma por la publiko ĉiun labortagon inter la 9a kaj 12a30 kaj inter la 13a30 kaj 17a30. Vizitantoj bonvolu tamen anticipe interkonsenti pri rendevuo.
Telefono (oficejhoroj): (03) 234.34.00
Telekopiilo (tagnokte): (03) 233.54.33

La ĝenerala respondeco de la revuo restas ĉe la redaktoro, la verkistoj mem respondecas pri siaj propraj artikoloj aŭ raportoj, kaj la enhavo de ili ne devas kongrui kun la opinio de la redaktoro.

Vertikale, dumonata periodaĵo por la aktivuloj de FEL. Abonoj ĉe FEL.
Numero 9-10, apero: junio-aŭgusto 1995
Korespondadreso: Vertikale
Cor van Ekelenburg
Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen
Tel.: (03) 234.34.00 (oficejhore)

## Eŭropaj projektoj

Antaŭ kelkaj monatoj mi verŝajne anoncis, ke mi kolektos informojn pri la Socrates-projektoj. Evidentiĝis, ke tio ne estas facila tasko; ekzemple letero mia de 11 majo al EU ankoraŭ restas sen respondo; ankaŭ aliaj jam promesitaj informoj ne venas.
Mi nun akiris tekston el la revuo *Klasse* (junio 1995). Tiun revuon ricevas ĉiuj flandraj instruistoj (preskaŭ 150.000). Kvankam la teksto ne donas kompletan klarigon, ŝajnas plej oportune mencii, ke la informoj tie estas haveblaj. Ne utilas reverki tekston, kiun ĉiu facile povas akiri.

Roland Rotsaert

*La menciita teksto (nederlandlingva) estas havebla ankaŭ ĉe la redaktoro.*

*Red.*

---

**Organigramo**
Ŝanĝoj

**Grupoj**

ANTVERPENO
La Verda Stelo
Ano: Cor van Ekelenburg
Sint-Bernardsestw. 1078, 2660 Hoboken
Tel.: (03) 827.66.43

OKCIDENT-FLANDRUJO
La Konko
Elisabethlaan 295, 8400 Oostende

**Administrantoj de FEL - Funkciuloj**

Red. Vertikale Cor van Ekelenburg
Sint-Bernardsestw. 1078, 2660 Hoboken
Tel.: (03) 827.66.43

---

Okazos:

- Limburga Tago: sabato 19/08/1995
- Faulhaber-semajnfino: 27-29/10/1995
  *Honorigo de Andreo Ĉeh;*
  *Programo pri instruado kaj kursoj.*





## Protokoloj de FEL-Kunvenoj

**Administrantaro, 94.11.06**

Admininistrantarkunsido 06.11.94 en restoracio "'t Putje", Zand Bruĝo.
La kunsido okazis en aparta salono en la unua etaĝo.

Ĉeestis: Wim De Smet, Lucien De Sutter, Alex Humet, Ghislain Jacobs, Ingrid Lievens, Katje Lödör, Roland Rotsaert, Jef Geraerts, Jacques Schram, Wim Slootmans, Edward Symoens, Jules Verstraeten, Johan Van Eenoo, Henny De Ketelaere, Cor van Ekelenburg, do 16 el 21 administrantoj.
Pardonpetis: Piet Glorieux.

La prezidanto malfermas la kunsidon je la 14.15a (malfruo pro komuna tagmezmanĝo), bonvenigante ĉiujn ĉeestantojn.

**Tagordo**

**1. Aprobo de la raporto** pri la kunsido de la 7a de majo, pri kiu la administrantaro en sia kunsido de la 20a de aŭgusto (Stokkem) havis neniun rimarkon, sed kiun ĝi pro malĉeesto de pli ol la duono de la administrantoj ne povis aprobi.

**2. Aprobo de la raporto** pri la administrantarkunsido de 20.08.1994 (Stokkem), jam aprobita de la estraro.

**3. Adapto en la estraro**
Jacques Schram, prezidanto de la antverpena grupo "La Verda Stelo" komunikas sian eksiĝon el la estraro (kombinado de ambaŭ funkcioj tro peza). La administrantaro konsentas, ke Ivo Durwael anstataŭas lin.

**4. Agado "Kiu konas kiun?"**
Nur malmultaj FEL-membroj ĝis nun respondis la alvokon de Wim De Smet komuniki al la estraro nomojn kaj adresojn de personoj apartenantaj al ilia gekonataro, aktivaj en la politika, ekonomia kaj/aŭ sociala kampo, kiuj povus esti utilaj al la celo de FEL. La prezidanto substrekas la gravecon scii kiun ni povas kontakti.

**5. Regularo pri la administrantaro**
Johan Van Eenoo kaj Wim De Smet kunmetis el la leĝo pri asocioj sen profitcelo, la statutoj kaj la interna regularo de FEL praktikan regularon pri la administrantaro kaj ĝiaj elektokunsidoj. Ne temas pri nova regularo! Tiun regularon jam aprobis la estraro, kaj nun ĝi estas prezentata por aprobo al la administrantaro.
Restas ĉe la administrantoj tamen kelkaj pridiskutendaj punktoj kaj demandoj, ekzemple:
- pri kunlaborantaj grupoj: la totalo de la diversaj kotizoj malhelpas tiajn grupojn kunlabori kun pluraj Esperanto-grupoj;
- pri ebla kresko de la administrantaro dum la laborjaro kaj la sekvoj de tio por la nombro de kooptitaj membroj.

La plimulto preferas ne aprobi la tekston antaŭ ol estos trovita respondo al tiuj demandoj. Ĉar mankas la tempo por plia diskuto, la prezidanto, bedaŭrante la mankon de decido, malfermas la kunsidon je la 15.10a.

Raportis Johan Van Eenoo.

---

**Ĝenerala Membrokunsido, 94.11.06**

La Ĝenerala Membrokunsido okazinta en Bruĝo la 6an de novembro 1994.

**A. Ĝenerala Membrokunsido**
La prezidanto malfermas la Ĝeneralan Membrokunsidon je la 15.10a bonvenigante la ĉirkaŭ 35 ĉeestantojn.

La prezidanto skizas la ĉi-laborjaran agadon de FEL.
Levas demandojn i.a.:
- A. Ruysschaert pri komitatanoj A kaj UEA; pri monato;
- M. Cwik (vizitanto) pri eŭropa agado kaj elektronika reto;
- H. Erasmus (vizitanto) pri kunlaboro kun nova nederlanda Esperantorevuo, ĉu komuna, eble ekde 1996.
La prezidanto demandas ĉu neniu alia deziras intervenon, sed neniu faras.
La prezidanto fermas la kunvenon je la 16.10a.

**B. Omaĝo al Grégoire Maertens**
En la ĉefa salono de la restoracio 't Putje apud 't Zand en Bruĝo okazas la omaĝo de s-ro Grégoire Maertens, eksprezidanto de UEA, kiel honormembro de FEL. Tiun omaĝon ĉeestas ĉirkaŭ 50 personoj.

**Parolas:**
FEL-prezidanto Wim De Smet;
F. Roose pri la rolo de G. Maertens en la bruĝa grupo;
E. Symoens pri la rolo de G. Maertens en FEL kaj UEA;
S. Milojeviĉ (dir-o UEA) pri la rolo de G. Maertens en UEA;
H. Erasmus pri la rolo de G. Maertens en la eŭropa agado;
G. Sossois pri la rolo de Maertens en BEF kaj APE;
J. Schram nome de La Verda Stelo;
Plie parolas J. Verstraeten, L. De Bruyne, M. Cwik, R. Wylleman kaj G. Maertens, filo de Grégoire Maertens.

Fine per persona alparolado kore dankas la honorato la organizantojn kaj ĉeestantojn pri la omaĝo.

Fino de la kunsido: ĉirkaŭ 18.30a.

Raportis Johan Van Eenoo.

---

**Administrantaro, 94.12.10**

Kunsido de la 10a de decembro 1994 en Bruselo.

Ĉeestis: Wim De Smet, Lucien De Sutter, Jef Geraerts, Piet Glorieux, Roger Goris, Ghislain Jacobs, Henny De Ketelaere, Ingrid Lievens, Katja Lödör, Jules Verstraeten.
Konsilanto: Marc Vanden Bempt.
Pardonpetis: Mari-Roza De Wolf, Edward Symoens, Johan Van Eenoo, Cor van Ekelenburg.

**Regularo pri la administrantaro**
La ĉeestantoj komentis la projekttekston kaj la novajn amendproponojn.
Kompare kun la teksto de oktobro 1994 ŝanĝoj estas faritaj en la eroj 3a, 3ĉ, 4, 5a, 5ĉ, 5d (forfalas), 6a, 6b, 6ĉ; kaj estas aldonitaj la eroj 6f kaj 6g. Vidu ankaŭ la tekston de Wim De Smet (94.12.12).

**3a** ... - kiu(j)n tiu grupo (post atentigo fare de la estraro aŭ de la Esperanto-centro de FEL) indikas en sia membraro antaŭ la fino de februaro; kaj ...
Grupoj aliĝintaj post la marta kunsido rajtas je delegito nur je la venontmarta kunsido.
**3ĉ** ... Administranto malĉeestinta sen valida motivo la administrantarkunsidon du fojojn en unu jaro estu anstataŭata de sia grupo.
**4** ... - Pri iuj kunlaborkondiĉoj (ekz. financaj) FEL kaj la kunlaboranta organizaĵo interkonsentu ĉe la konsentodeklaro.
Kondiĉoŝanĝoj bezonas la aprobon de ambaŭ grupoj.
**5ĉ** Cetere valoras por la kooptitaj administrantoj la enhavo de punkto ĉ de la delegitoj de la grupoj (vidu en ero 3) escepte de la dekjareco.
**6a** ... Ĝi ankaŭ devas esti kunvokata se almenaŭ kvin administrantoj postulas tion.
...
**6b** ... Tamen la kunsido de marto devas okazi principe en la Esperanto-centro de FEL.
**6f** Honoraj membroj de FEL estas invitataj al ĉiuj administrantarkunsidoj, kie ili povas partopreni per siaj konsiloj, sen havi voĉdonrajton.
**6g** Al administrantarkunsido povas esti allasataj kiel konsilantoj tiuj personoj, kiuj estas invititaj de la prezidanto.

La teksto ne povis esti aprobata, ĉar mankis 1 persono por havi la minimuman kvorumon de 11, kiu ebligas decidon konforman al la leĝo.

Protokolis Ingrid Lievens.

---

**Komisiono pri la Domo, 94.12.16**

Kunveno de la 16a de decembro 1994.

Ĉeestis: Ivo Durwael, Jacques Schram, Cor van Ekelenburg, Paul Peeraerts kaj Jules Verstraeten.
Post funda diskuto, la kunvenintoj unuanime decidis proponi la suban regularon pri la fondaĵo Jules Verstraeten por aprobo al la estraroj de FEL kaj La Verda Stelo.

*Reglement betreffende het fonds Jules Verstraeten.*

*A. Algemeenheden*

Art. 1 *Binnen het kader van de Vlaamse Esperantobond werd op 30 september 1994 een speciaal fonds opgericht, beheerd door een aparte raad, maar waarvan het geld een onderdeel is van de kas van de Vlaamse Esperantobond.*

Art. 2 *Dit fonds draagt de naam "Fonds Jules Verstraeten" en is bedoeld als een blijvende hulde aan de heer Jules Verstraeten, ter herinnering aan zijn jarenlange verdiensten voor de Esperantobeweging.*

Art. 3 *De bedoeling van dit fonds is gelden te verzamelen, die aangewend kunnen worden voor de behuizing van de Vlaamse Esperantobond en van haar plaatselijke afdeling in Antwerpen, La Verda Stelo.*

*B. De Raad*

Art. 4 *De raad van het fonds bestaat uit:*
*- een vertegenwoordiger, die aangeduid is door het bestuur van de Vlaamse Esperantobond;*
*- de direkteur van het Esperanto-centrum of zijn afgevaardigde;*
*- twee vertegenwoordigers, die aangeduid zijn door het bestuur van de plaatselijke afdeling in Antwerpen, La Verda Stelo;*
*- de heer Jules Verstraeten.*
*Om geldig te kunnen vergaderen moeten de vier vertegenwoordigers aanwezig zijn. Alleen de heer Jules Verstraeten heeft het recht om af te zien van deelname aan de vergaderingen.*

Art. 5 *De vertegenwoordigers van de Vlaamse Esperantobond en van La Verda Stelo moeten minstens eens per jaar hetzij vervangen worden, hetzij herbevestigd worden door de betreffende besturen. De heer Jules Verstraeten blijft levenslang lid van de raad, tenzij hij de wens uitdrukt om die taak niet verder te zetten.*

Art. 6 *Beslissingen van de raad moeten unaniem genomen worden, inclusief eventuele wijzigingen aan dit reglement en eventuele opheffing van het fonds.*

Art. 7 *De direkteur van het Esperanto-centrum of zijn afgevaardigde is de beheerder van het fonds en moet al het nodige doen om de beslissingen van de raad te laten uitvoeren.*

Art. 8 *De raad vergadert telkens als een van de raadsleden hiertoe oproept, en minstens een maal per jaar.*

*C. Inkomsten en uitgaven*

Art. 9 *De vertegenwoordigers van de Vlaamse Esperantobond en van La Verda Stelo beslissen samen om een kampanje op te starten voor het inzamelen van gelden voor een konkreet doel, telkens wanneer dit nodig en opportuun lijkt.*

Art. 10 *De ingezamelde gelden mogen gebruikt worden voor een doel zoals vermeld in artikel 3 waarover eenstemmigheid bereikt wordt. De raad zal er wel op waken om een reserve te behouden van minstens 50.000 BEF. Deze reserve kan echter aangesproken worden in geval van een onvoorzienbaar onheil.*

Fine la kunsido ankaŭ unuanime decidis pagigi la novan flagon kaj la fasadorubandon, kiuj evidente plibeligis la domon, el la fondaĵo.

Protokolis Ivo Durwael.

---

**Estraro, 94.12.18**

Estrarkunveno de 18.12.1994 en la Esperanto-centro, Frankrijklei 140, 2000 Antverpeno, ja la 9.30a.
Ĉeestis: Wim De Smet, prezidanto; Alex Humet, vicprezidanto; Ingrid Lievens; Johan Van Eenoo, sekretario; Roland

Rotsaert, kasisto; Ivo Durwael, ankaŭ kiel reprezentanto de la Esperanto-domo.

Wim De Smet malfermas la kunsidon je la 9.30a, bonvenigante ĉiujn kaj esprimante sian ĝojon pri la ĉeesto de ĉiuj estraranoj. Ĉar la invito kun tagordo ial ne atingis la estraranojn ĝustatempe, la kunsido komenciĝas per laŭtlego de la tagordo. Enŝoviĝas kaj aldoniĝas kelkaj punktoj.
Alex Humet pardonpetas pro sia malĉeesto dum la antaŭa kunsido kaj konstatas malagrablan etoson en la ĉi-jaraj administrantar- kaj estrarkunsidoj. Laŭ Alex Humet la prezidanto pli permesu al la ĉeestantoj esprimi sin. Li ne trudu al la estraranoj sian antaŭdecidon permesante la pridiskuton pro formo. Krome li ne prenu la aferojn tro persone. Alex Humet konfirmas finpraktiki sian mandaton ĝis marto 1995.

**Tagordo**

**1. Konsideroj de la prezidanto**
Wim De Smet memorigas, ke dum 8 jaroj li estis ekster la movado kiam li akceptis la prezidantan funkcion en FEL. Pro sia ordigema, konsekvenca kaj logika karaktero li abomenas la "talpecon", la inercion en kiujn FEL malsuprenglitas. Certe, FEL nun ne estas kiel antaŭ 17 jaroj: ĝi nun havas buĝeton de 8 milionoj, kaj proprajn laborantojn. Certe kelkaj misfaroj hereditaj de antaŭaj estraroj malpurigas nian blazonon, tial la nuna estraro provas tiujn solvi. Sed Wim De Smet ne volas esti prezidanto de afero kiu riskas tute malintegriĝi pro ĝia propra inercio. Li bedaŭras, ke la propono de klara regularo, la bazo de pli ordiga funkciado, por la administrantaro estas tiel malŝatata kaj ĝis nun ne aprobiĝis. La nuna estraro feliĉe estas aktiva.
Dum la diskuto pri Monato la 3an de decembro tre ŝokis lin la demando de iu "Ĉu valoras paroli pri tio?"

Johan Van Eenoo rimarkigas, ke ne la regularo estas malŝatata, sed la maniero laŭ kiu oni volas aprobigi ĝin. Duonhora administrantarkunsido ne permesas administri, sed nur kapjesi aŭ kapnei.
Johan Van Eenoo konstatas kun Ingrid Lievens kaj Alex Humet iun "preterlaboron" inter la FEL-estraro kaj la personaro de la Esperanto-centro. Tiu lasta ja estas en la funkciado de FEL pli konstanta faktoro ol la ĉiujare elektita estraro. Wim De Smet ankaŭ notis "tromemstarecon" de la centro kaj opinias, ke tiu ne sufiĉe informas la estraron. La kunlaboro inter FEL kaj la centro estu simbiozo, ne parasitismo.

**2. Raporto pri la estrarkunveno de 15.10.1994**
2.a) ... pri la ĉina ekspozicio ...

**3. Raporto pri la estarkunveno de 20.11.1994**
Aprobita. Estis la jenaj rimarkoj:
3. 06/11 Ĝenerala kunveno: *la prezidanto donis supervidon de la laborjaro.* Estis *pluraj* demandoj.
4. dua streko: Ivo Durwael respondis.
kvara streko: Brazilano, kiu estis en Hungario *petas* helpon ...
5. dua streko: ... pro malsano de Paul Peeraets.
kvina streko: aldoniĝas: Pro la fakte, ke estas nur unu respondeculo, la komisiono povas esti rekonsistigata.
6. Do okazos nova kunsido *je sabato la 10a de decembro 1994.*
Roland Rotsaert opinias, *ke* Wim De Smet serĉas problemojn kaj *tial* faras novan regularon.
7. dua streko: Bruĝo: komenci*ĝ*is kurso ...
sesa streko: Hasselt: kurso komenci*ĝ*is.
10. Venis letero el Houthalen, sed ne *taŭgas* por la *librotenado. La afero enordiĝos.*
11. Oostende: ... Flory *Witdoeckt* ...
12. Venis *letero* kaj aliaj plendoj *pro* artikoloj *pri malneŭtraleco* en Horizontaal ... (samtempe aliaj *petas* politikajn agojn de FEL.)
Wim de Smet: FEL jam faris ... kaj *tio* povas kaŭzi problemojn!
Wim De Smet: en la statutoj, art. 3 troviĝas: "De vereniging is beslist neutraal ... D.m.v. de vereniging of in haar schoot mag geen propaganda worden gemaakt die niet conform haar doelstellingen is." *Estas dezirata komunikigi tion.*
19. La gvidantoj *laboras* senpage.

**4. Administrantarkunsido 06/11**
Johan Van Eenoo maltrovas siajn notojn de tiu kunsido kaj de la Ĝenerala Kunsido





de 06/11. Wim De Smet sendos ideojn kaj ankaŭ la tiama tagordo estos utila.

**5. Administrantarkunsido 10/12**
La raporto ankoraŭ ne estas preta.

**6. Ĝenerala Kunsido 06/11**
Vidu 4.

**7. Envenintaj korespondaĵoj**
1) Letero el Paderborn: ĉu FEL partoprenos en la luado de aviadilo por vojaĝi al Tampere en 1995? FEL ne partoprenos, sed se Paderborn donos prezojn kaj horojn, FEL estos peranto.
2) "Boekhandel Grote Muur" ŝatus kontaktojn kun FEL per Esperanto, kaj povas vendi al ni librojn el Ĉinio. Fakte mankas al FEL vojo por aĉeti librojn.
3) Batos. Generale Werkgroep Batos sendis oficialan leteron (10/11) petante la repagon de la mono. Jam decidiĝis, ke tio estos farita.
4) Aliĝilo de s-ro Henri Schutters kiel membro de la grupo de Peer.
5) Teksto de Roland Rotsaert pri Bond voor Vormings- en Ontwikkelings-samenwerking (vidu 10.).
6) Letero de s-ro Vanderbauwhede el Desselgem kun i.a. ideoj por financa stato.
7) Ĉe Alex Humet alvenis letero pri prelegvojaĝo de s-ro Lev Medvedev en Belgio. Wim De Smet konsideros ĝin.

**8. Financa stato**
- Ne estas manko de likida mono. Tamen FEL ne estas profitdona. Zorgojn ni nun ne havas.
- Kunvenis la Komisiono pri la Domo. Ĝi aĉetis novan flagon kaj fasadan rubandon pagitajn el la fondaĵo Jules Verstraeten.
Tio reaperigas la demandon ĉu FEL partoprenos en la fondaĵo Jules Verstraeten. Tio ne ŝanĝus la financojn de FEL. En la fondaĵon jam 162.000,- fr. estas donacitaj.

**9. La ĉina ekspozicio (Oostende kaj Antwerpen)**
Wim De Smet partoprenis ambaŭ inaŭgurojn. Entute 50-60 ĉeestantoj. Nek en Oostende nek en Antwerpen vizitis multaj la ekspozicion. Konkludo: la malgranda intereso prias Ĉinion, ne Esperanton. La ekspoziciinto ŝajnas kontenta, kaj volas reveni.
Ivo Durwael proponas renverse labori: ne inviti la publikon al ni, sed montrigi la ekspozicion (kun informo) en lernejoj, akademioj, bankoj kaj tiel plu.
Ĉu ni ripetos la ekspozicion? Alex Humet opinias, ke por tio necesas bona kaj ĝustatempa informo, ne nur buŝa, sed ankaŭ perletera.

**10. Bond voor Vormings- en Ontwikkelingsorganisaties** (aspc)
BVVO estas kupola organizaĵo por asocioj kiel FEL, Volkshogeschool, VVF kaj tiel plu, konsilanta al la Flandra Ministro pri Kulturaj Aferoj. Membroj (nun 15-20) estas flandraj asocioj, kiuj havas tutlandan organizaĵon kaj lokajn grupojn. FEL ankoraŭ ne membriĝis, kvankam plenumante tiujn kondiĉojn.
Nun prepariĝas nova regularo pri subvenciado de kulturaj organizaĵoj de la flanko de la Flandra Registaro. Roland Rotsaert ĉeestis informan kunsidon de BVVO kaj disdonis raporton al la estraranoj, ĉe kiuj ĝi haveblas.
La estraro tralegas la 9 bazajn aktivecojn el kiuj la 6a estas deviga, kaj minimume 4 estus plenumitaj por rajtigi je subvencio de 500.000 fr. + salajro subvenciata (95%) por plentempa dungito (eble 1/4 en la E-centro kaj 1/4 en Esperanto-biblioteko Kortrijk kaj 1/2 en Antwerpen). FEL senpene kapablas realigi tion post kelkaj sinadaptoj al la regularo. 5 aŭ 6 funkcioj estas realigeblaj laŭ la estraro.
La estraro laŭdas Roland Rotsaert pro lia iniciato kaj opinias la regularon favoran al FEL. Ni atendu la definitivan tekston (fine de februaro 1995). La sekvonta estraro prilaboru la aferon.

**11. Horizontaal**
Ingrid Lievens pliklarigas la raporton pri la rezultoj de la enketo. La plej granda parto de la membroj ne reagis! Tiuj kiuj respondis plej ofte plendas. Laŭ Wim De Smet ekzemplo de la "inercio" en FEL. La estraro konstatas tro grandan strukturan distancon inter la membroj kaj la estraro.
Aldoniĝu en la raporto punkto 15: aliaj ideoj: ankoraŭ ne envenis.
Alex Humet sugestas telefone kompletigi la enketon: ekzemple Ingrid Lievens venu

al la Centro kaj telefonu iel hazarde elektatajn membrojn.
La aŭtonomeco de la redaktoro de Horizontaal ŝokas Wim De Smet, kiu donas ekzemplojn pri maltaŭgaj intervenoj en sia teksto. Wim De Smet jes agnoskas, ke la redaktoro korektas lingvajn erarojn, sed li ne tuŝu la enhavon de la teksto.
La estraro konsentas, ke la teksto estu resendata al la verkinto antaŭ iu limdato (kiun ĝi ne fiksis), se la verkinto tion postulas. Tiu regulo estu komunikata per ĉiufoja anonco en la kolofono de Horizontaal.

**12. Vertikale**
La redaktoro de Vertikale petas per Ivo Durwael, ke Johan Van Eenoo sendu al li la raportojn pri la estrarkunvenoj kaj la administrantarkunvenoj.
Ankaŭ la raportoj de la komisionoj aperu en Vertikale.

**13. Monato**
Mankas la tempo por tiu ĉi punkto. La Komisiono pri Eldonaĵoj kunvenu antaŭ la jarfino por pridiskuto.

**14. Ĝenerala Membrokunsido**
En Nederlando: la 25an de marto 1995.
En Flandrio: la 11an de marto 1995.
Programo: je la 10a matene komisiaj kunsidoj al kiuj membroj estas invitataj. Je la 2.30a posttagmeze Ĝenerala Membrokunsido 1995.

**15. Venonta estrarkunsido**
La 15an de januaro 1995 je la 8.30a (!) matene.

**16. Venonta administrantarkunsido**
Vendredon 06.01.1995, 19.30a en la Centro. Johan Van Eenoo jam pardonpetas.

**17. Diversaĵoj**
Ne estas diversaĵoj.

Wim de Smet fermas la kunsidon ja la 13a horo kaj kvarono.

Raportis Johan Van Eenoo.

---

**Komisiono pri Eldonaĵoj, 94.12.23**

Kunveno je 23 decembro 1994, 18.25–21.00a en Esperanto-Centro, Antwerpen.

Ĉeestas: Alex Humet (prezidas), Wim De Smet, Ivo Durwael, Gerd Jacques, Roland Rotsaert (protokolas).
Ivo Durwael kaj Gerd Jacques dum parto de la kunveno forestis.

**Financoj**
Wim De Smet esprimas sian deziron, ke la financa kaj enhava respondecoj de Monato estu ekster FEL. Alex Humet replikas, ke la nuna situacio estas heredita; alternativo por la nuna "granda" asocio (7 oficistoj) estus eta asocio, kiel ekzemple APE. Gerd Jacques aldonas, ke Monato nun je 1,3 milionoj jare kontribuas al pago de salajroj kaj luo de la domo.
Wim De Smet serĉas iun mezan vojon: ekstera persono/asocio eldonu ĝin, sed transdonu la teknikan laboron al FEL. Roland Rotsaert ripetas, ke la financa risko estas minimuma, ĉar la abonoj estas antaŭpagitaj. Torben Kehlet siatempe ne pro financa kialo ĉesis la eldonadon. La estraranoj nur persone respondecas se ili ne intervenas kiam necesas. Tial la antaŭa estraro en septembro de 1993 informis la membrojn, kiam ĝi konstatis, ke la kaso estis malplena kaj ke sufiĉe granda perdo estis prognozita. Ĉiuokaze, la rezervoj de FEL (tiam ĉ. 1,5 milionoj) sufiĉas por elteni dum minimume unu jaro en okazo de gravaj problemoj. Li ne kontraŭas apartigon de Monato post kelkaj jaroj, kiam FEL kaj Monato ne plu bezonas unu la alian kaj/aŭ se evidentiĝas, ke Monato reprezentas plej grandan parton de la buĝeto de FEL.
Gerd Jacques prezentas spezokonton faritan laŭ alia metodo: sen la ĝeneralaj kostoj (luo kaj salajroj, kiuj ĉiuokaze estu pagataj) aktivaĵoj estas profitdonaj.
Laŭ Roland Rotsaert la problemo troviĝas ĉe la malfacila kalkulado de la kostprezo.
Ivo Durwael reagas, ke eĉ analizisto ne kapablas alporti monon; necesas pli la enspezigaj laboroj.
Roland Rotsaert opinias, ke en okazo de apartigo de Monato, la proponita Sonorilo-konstruo ne estas taŭga.





Alex Humet konkludas, ke ne Monato, sed la centro entute estas riska por FEL.
Wim De Smet korektas, ke la centro estas riska, kaj ke Monato estas granda ero de ĝi.

**Organizo**
Por Wim De Smet Monato respondas nek al la reguloj de la statuto, nek al la (ĝisnuna) regularo por subvenciado.

**Enhavo**
Wim De Smet demandas kiuj rilatoj nun ekzistas inter la redaktoroj kaj la eldonejo.
Roland Rotsaert respondas, ke la transigo de Maul al FEL okazis subite, kaj ke pro diversaj problemoj dum la unuaj jaroj ne eblis ion formale aranĝi. Nur dum 1994 la situacio stabiliĝis, sed ne jam reaperis la informiloj por kunlaborantoj kaj redaktoroj. P. Gubbins ĵus forsendis unuan parton de kurso pri ĵurnalismo al la kunlaborantoj kiuj enskribiĝis por ĝi.
Wim De Smet opinias, ke necesas:
- redakta komitato por decidi pri la politiko de la revuo kaj pri la enhavo de ĉiu numero (ĉiumonata, nepagata tasko); kaj
- ĉefredaktoro, kiu loĝas ne tro malproksime de la eldonejo (100–150 km).
Ivo Durwael atentigas pri la fakto, ke ĉefredaktoro estos aldona elspezo, por kiu denove enspezoj estu trovataj.
Alex Humet rimarkas, ke ne Monato, sed la E-movado en Flandrio estu la ĉefa zorgo de la estraro.
Wim De Smet konkludas, ke bezonataj estas kvalifikita ĉefredaktoro, ĉiumonate ĉeestanta, kaj redakta komitato. La sama valoras por Horizontaal.
Roland Rotsaert krome insistas, ke laŭ kutimaj principoj en la gazetaro (detaloj esplorotaj) la redakcio estu sendependa de la estraro de FEL. Ivo Durwael aldonas ke utilus, ke la estraro redaktas gvidliniojn kaj ke avantaĝo de la nuna, nur teknika, redaktoro estas, ke eblas pli varia enhavo.

**Taskodivido**
Wim De Smet: Ĉar ne estas alia solvo, FEL minimume dum la venonta jaro restos eldonanto de Monato. Li esploros la aliajn eblecojn.
Alex Humet klopodos konsistigi redaktan komitaton (volontula laboro) por ĉiumonate prepari la novan numeron. Tiu komitato serĉu ĉefredaktoron.
Laŭ Roland Rotsaert en la redakta komitato estu minimume unu profesiulo kaj la FEL-estraro ne havu plimulton en ĝi; krome oni ne malatentu la nunajn kunlaborantojn kaj redaktorojn de Monato.

**Fino**
Wim De Smet estas dankema ĉar ĉi-foje eblis serioze diskuti la aferon. Kvankam li havas kelkajn rimarkojn pri la protokolo de la pasinta kunveno, ĝi estu konsiderata aprobita.

Protokolis Roland Rotsaert.

---

**Administrantaro, 95.01.06**

La administrantara kunsido de la 6a de januaro en la Esperanto-centro en Antverpeno.

Komenciĝo: 19.30
Finiĝo: 20.10

Ĉeestis: Wim De Smet, Ivo Durwael, Alex Humet, Jules Verstraeten, Jacques Schram, Jef Geraerts, Paul Peeraerts, Cor van Ekelenburg, Henny De Ketelaere.
Senkulpiĝis: Johan Van Eenoo, Edward Symoens, Roger Goris kaj Ghislain Jacobs.
Katja Lödör ne povis ĉeesti. Piet Glorieux kaj Ingrid Lievens devis lastminute rezigni pri ĉeesto pro veteraj kialoj.

1. **Wim De Smet** bonvenigas la ĉeestantojn kaj esprimas sian bedaŭron, ke kelkaj administrantoj povis sed ne volis veni.

2. **Amendoj de la propono** pri Regularo pri la Administrantaro, kiel ĝi estis formulita de Wim De Smet je la 12a de decembro 1994.
a) Piet Glorieux formulis sian dubon pri la jura praveco de art. 6ĉ: ĉu administranto rajtas anstataŭigi sin.
Respondo de Wim De Smet: La leĝo ĉi-rilate nenion antaŭvidas. Ĉar Glorieux ne insistas pri ŝanĝiĝo de la teksto, oni konservu la punkton senŝanĝa.

b) Demando Jef Geraerts pri punkto 5c: Kial estu minimume 5 kooptitaj administrantoj? Kio okazos se ne troviĝas 5 kandidatoj?
Respondo Wim De Smet: Ĉar la statuto antaŭvidas ĉi tiun minimuman kvanton. Se ne estos 5 kandidatoj, oni ne povos konsistigi administrantaron.
c) Amendopropono Jef Geraerts pri punktoj 3a kaj 3ĉ: Jef Geraerts opinias, ke la administrantaro restu senŝanĝa dum tuta laborjaro. Post diskuto Wim De Smet proponas adapti la lastan alineon de punkto 3ĉ: "*Administranto malĉeestinta sen valida motivo la administrantarkunsidon du fojojn en unu jaro estu anstataŭata de sia grupo en la venonta laborjaro.*"
En 5ĉ aperu jena teksto: "*Administranto malĉeestinta sen valida motivo la administrantarkunsidon du fojojn en unu jaro prefere ne plu estu rekomendata en la venonta laborjaro.*"
Jef Geraerts ankaŭ atentigas, ke administranto, kiu anstataŭigas sin estu konsiderata kiel ĉeestanta. Sekve oni aldonu al punkto 5ĉ: "*Tiu administranto estas konsiderata kiel ĉeestanta.*"
ĉ) Jef Geraerts akre riproĉas al Wim De Smet, ke li organizas mallongajn administrantarkunsidojn. Administrantoj devas fari longan vojaĝon, sed neniam havas eblecon por eldiskuti la temo(j)n de la tagordo. Li proponas administrantarkunsidojn, kiuj daŭru minimume 2-3 horojn kaj neniam okazu samtempe kun aliaj programoj.
La unua punkto akceptiĝas per 4 poraj, 3 kontraŭaj kaj 2 sindetenaj voĉoj. La 2a malakceptiĝas per 1 pora, 5 kontraŭaj kaj 3 sindetenaj voĉoj.
Sekve oni aldonu al punkto 5h: "*Por ĉiu administrantarkunsido estu antaŭviditaj minimume 2 horoj.*"
Wim De Smet interrompis la kunsidon je la 20.10a, sed li petis al la administrantoj por resti disponeblaj por la okazo, ke alvenus pliaj administrantoj ĝis la necesa kvorumo. Neniu aldoniĝis.
Pro manko de la necesa kvorumo (11) do la amendita teksto ne estis aprobita.

Protokolis Ivo Durwael.

---

**Estraro, 95.01.15**

La estrarkunsido okazinta dimanĉon la 15an de januaro en la Esperanto-centro, Frankrijklei 14, 2000 Antverpeno.

Ĉeestis: Wim De Smet (prezidanto), Alex Humet (vicprezidanto), Roland Rotsaert (kasisto), Ivo Durwael, Ingrid Lievens, Johan Van Eenoo (sekretario) kaj Paul Peeraerts (direktoro de la Grafika Centro (invitita)).

La prezidanto malfermas la kunsidon je la 8.45a bonvenigante ĉiujn ĉeestantojn, speciale la du ĝustatempe alvenintajn el Bruĝo, kaj kontenta pri tio, ke la estraro estas kompleta malgraŭ la frua matenhoro.

**Tagordo**

**1. Novjarsalutoj de la prezidanto**

**2. Tagordopunktoj**
La sinsekvo ne estas regula: mankas 3 punktoj. La tagordo estas do longa 29 punktoj, ne 32. Neniu alia punkto aldoniĝas aŭ enŝoviĝas. En la raporto uziĝas la regula sinsekvo.

**3. Definitiviĝas kaj aprobiĝas** la raporto pri la estrarkunsido de 15.10.1994.

**4. Aprobiĝas la raporto** pri la estrarkunsido de 20.11.1994.

**5. Tralegiĝas la raporto** pri la estrarkunsido de 18.12.1994. Estas kelkaj rimarkoj. Johan Van Eenoo dissendos korektitan raporton.

**6. Laŭtlegiĝas kaj aprobiĝas** la raporto pri la administrantarkunsido de 06.11. 1994. La prezidanto malfermas la kunsidon ja la 15.10a (ne 16.10a).

**7. Aprobiĝas la raporto** pri la administrantarkunsido de 10.12.1994. Ne ŝanĝiĝis punktoj 3a kaj 5ĉ. 5ĉ: "enhavo" anstataŭas "dispono".

**8. Pri la raporto** de la administrantarkunsido de 06.01.1995 estis jenaj rimarkoj:





1) Katja Lödör, Ingrid Lievens kaj Piet Glorieux pardonpetis, la du lastaj pro vetera malhelpo.
2) La estraro konsentas - detenas sin Ivo Durwael - aldoni la jenajn frazojn je la fino: "La prezidanto interrompis la kunsidon je la 20.10a, petante, ke la ĉeestantoj restu kun la espero, ke alvenu ankoraŭ pliaj administrantoj. Tamen, montriĝis dum la daŭro de la vespero, ke eble pro la malbona vetero neniu plia alvenis. Pro manko de la necesa kvorumo de 11 administrantoj la amendita teksto ne povas esti aprobata."
3) En la lasta linio: "antaŭviditaj" anstataŭ "antaŭvidita".
Ivo Durwael havigos korektitan version de la raporto.

**9. Laŭtlegiĝas kaj aprobiĝas la raporto**
Rimarkoj: H. Erasmus (ne J.), G. Sossois (ne A.), J. VerstraeteN, Wylleman (sen s). En la lasta frazo: la honorato (ne honoriganto). Fino: 18.30a.

**10. Mankis al Paul Peeraerts** la tempo por fari raporton pri la funkciado de la E-centro. Li skizas ĝeneralan superrigardon. Citindaj estas la kunlaborantino H. Geeraerts kaj la 6-semajna staĝo de franco kun oficiala kontrakto en Esperanto inter la centro kaj la franca ŝtato. Paul Peeraerts faros raporton kiam li havos pli da tempo.

**11. Envenintaj korespondaĵoj**
a. de Raad voor Cultuur Provincie Antwerpen: kial FEL ne ĉeestas la organizaĵojn kaj kunsidojn? Wim De Smet respondos, ke pro manko de informo pri la transiro al alia reprezentanto, la novan reprezentanton ne atingis la invitoj.
b. "Vers van de Pers" invitas al kunsido okazonta 09.02.1995 posttagmeze. Wim De Smet ĉeestos.
c. Letero de "Burgerdienst voor de Jeugd (BDJ)" petanta skribi al s-ro J.L. Dehaene pri la "vrijwillige gemeenschapsdienst" per aldonita peticteksto. Paul Peeraerts zorgos pri la letero al s-ro Dehaene.
ĉ. Letero de s-ro Vanderbauwhede kun bondeziroj kaj gratuloj al la prezidanto + konsideroj pri Horizontaal. Wim De Smet jam respondis.
d. La Masereelfonds estas preta kun SAT eldoni informbroŝureton pri Esperanto, danke al la agado de niaj membroj G. Jacobs kaj Fernandez. Invitas FEL al kunsido la 26an de januaro 1995 en Bruselo. La estraro bedaŭras, ke FEL estas lasita ekster la afero. FEL tamen ne restu indiferenta. Wim De Smet priparolos la aferon kun s-ro Fernandez.
e. En Gent malfermiĝos la kluba domo. Vendredon 24.02.1995 okazos kunveno por la membroj de la genta grupo. La aliaj interesitoj estas invitataj viziti la novan klubejon sabaton 25.02.1995. Venos ankoraŭ invitletero.

**12. Financa stato**
Ciferoj disponeblos ne antaŭ kelkaj semajnoj ekde nun, kiam alvenos la bilanco. Ĝis tiam neeblas doni superrigardon de la financa stato de FEL. Estas nek danĝeraj nek ĝojigaj signaloj. La buĝeto 1995 bontempe ensendiĝis.

**13. Rekompenco de kostoj**
Post diskuto kaj ĉar ankoraŭ ne disponeblas la bilanco la estraro interkonsentas nur pri la principo de rekompenco. Ĉiu estrarano kiu deziras rekompencon havigu antaŭ nelonge al la E-centro siajn kostojn kun pruvilo. Tio servos por la venontjara librotenado, ĉar certaj kostoj estas subvencieblaj.
Dum la venontmonata kunsido ni decidos pri kiel kaj al kiu fari la rekompencadon. Estas diversaj proponoj: limigi la rekompencon por persono kaj konsideri la saldon kiel donacon al FEL (Ivo Durwael), malfermi konton je la nomo de la rekompencota persono - la mono restas do en FEL - kiu rajtas uzi tiun konton por aĉeti artikolojn en la FEL-butiko aŭ eĉ trinkaĵojn aŭ manĝaĵojn ĉe la bufedo (Johan Van Eenoo).

Enŝoviĝas mallonga paŭzo en la kunsidon post tiu ero de la tagordo.

**14. Komisionoj**
a. La Komisiono pri Instruado ekfunkciis kaj pri sia unua kunsido (17.12.1994) dissendiĝis raporto. Laŭ Wim De Smet la sugesto prezenti Esperanton en lernejoj apartenas al la Komisiono pri Informado.
b. La Komisiono pri la Domo pritraktis la enhavon de la fondaĵo Jules Verstraeten

(vidu punkton 24).
c. La Komisiono pri Eldonaĵoj pritraktis Monaton (vidu punkton 16).
ĉ. Ankaŭ la Komisiono pri Informado kunvenos en la venontaj semajnoj.

**15. Sonorilo**
La 3an de decembro 1994 okazis en la E-centro la ĝenerala kunsido de la asocio Sonorilo. La raporto ne dissendiĝis ĝis nun, parte pro la malsano de G. Maertens. Malĉeestis la kunsidon la direktorino de Sonorilo, s-ino M. De Schepper-Vereecken kaj ŝia edzo. Neniu informo de ili envenis antaŭ tiu kunsido, sed poste. Allasiĝis kelkaj novaj administrantoj kaj indikiĝis nova respondeculo anstataŭonta la direktoron: Cor van Ekelenburg.
Intertempe la familio De Schepper daŭrigas sian agadon. P. De Schepper dissendis la numeron 3 de la revuo pri kiu li alvokas pagi ĉe "Boekenclub Kariljono". Kio estas la rilato inter Sonorilo kaj Kariljono?
La 3an de februaro okazos nova administrantarkunsido de Sonorilo.

**16. Monato**
Aprobiĝas la raporto far Roland Rotsaert de la kunsido de 23.12.1994. Fel plue eldonos Monaton. Alex Humet konsistigos redaktan komitaton.

**17. Kiu konas kiun?**
Envenis reago speciale de la grupo de Leuven. La nun ekzistanta listo fotokopiiĝos kaj disdoniĝos en la estraro. Nova alvoko de Wim De Smet.

**18. Rilatoj kun flandraj strukturoj kaj projektoj**
a. La Flandra Komunumo pretas elspezi monon al ekonomiaj kaj kulturaj projektoj en la ekskomunistaj ŝtatoj. Wim De Smet jam kontaktis 3 instancojn, sed ricevis respondon nur de unu (Bydgoszcz). Kiel FEL povas partopreni en tiu apogo? Ĉu ekzemple apogi la Esperanto-centron en Bialystok? La FEL-centro sendos fakson al s-ro Jaroslaw Parzyszek en Bialystok kaj rekontaktos Bydgoszcz.
b. Ĉu FEL prenos iun iniciativon okaze de la 50a datreveno de UN? Por diskonigi tiun datrevenon en la Flandra Komunumo Ivo Durwael proponas eldoni specialan festnumeron de Monato dissendotan iom pli amase. Wim De Smet proponas la saman por Horizontaal. Ni submetu nian proponon antaŭ 31.05.1995. Paul Peeraerts kaj Ivo Durwael plikonkretigos tion. Pri Monato la redaktara grupo zorgos, por kromnumero de Horizontaal ni bezonas verkistojn kaj eventuale tradukistojn.
Ivo Durwael laŭtlegas la regularon pri tiaj projektoj. La Flandra Komunumo subvencias 85% (ne investkostojn). Privaloras projektoj direktitaj al gejunuloj kaj multkultura socio. Paul Peeraerts kaj Ivo Durwael plie pripensos tion.
Johan Van Eenoo proponas ideon pri instruada projekto plenumebla ekzemple en Antverpeno (urbo kun multaj enmigrintoj): uzi Esperanton kiel pontlingvon en etne nehomogenaj klasoj en la baza lernejo. La enlanda (aŭtoĥtona) lingvo kaŭzas gravan barieron kaj por la integriĝo kaj por la instruado de aloĥtonaj infanoj, ne nur en lingvaj lecionoj, sed ankaŭ ekzemple en lecionoj pri geografio, historio, matematiko ktp. Wim De Smet dubas pri la ideo kaj irigas ĝin al la Komisiono pri Instruado.
c. Vortaro de Muniksma. S-ro Vogelmann, la nuna prizorganto, donis la manuskriptaron kaj ĉiujn rajtojn reeldoni la vortaron al UEA. Ĉu UEA transdonus la rajtojn al FEL (temas pri bonkvalita, aktualigita vortaro reeldoninda, eĉ reeldonenda en la kadro de niaj rilatoj kun Orienteŭropo).
IKEV pretas laŭ Roland Rotsaert subteni tiun iniciativon. Ĉu estus ebla speciala interkonsento kun UEA laŭ kiu UEA cedus la tejtojn kontraŭ tantiemo. Roland Rotsaert informos s-ron Braun.
ĉ. Roland Rotsaert sciigas, ke la Eŭropa Komunumo, restrukturigante siajn edukajn projektojn (Erasmus ktp.), redaktis tute novan regularon ankoraŭ ne komplete aprobitan. La detaloj haveblas post kelkaj monatoj.

**19. Propono De Backer pri radioelsendoj**
S-ro De Backer (Kortrijk) proponas, ke la "Radio Vlaanderen Internationaal" ankaŭ enŝaltu Esperanton. La grupo de Kortrijk pretas havigi programon en Esperanto.
La estraro timas, ke BRT ne akceptos tion pro malsufiĉe granda aŭskultantaro, kaj ke la proponintoj klopodas ŝovi la realigon de tiu ideo sur la ŝultrojn de FEL. Roland Rotsaert havigos al la estraro informojn pri la internaciaj elsendoj de BRT. La estraro preferas subteni la jam ekzistantajn Esperanto-elsendojn ol komenci novan. Alex Humet mencias, ke per parabola anteno eksterlandaj radioj estas perfekte kapteblaj.

**20. Nova administrantarkunsido**
Ĝi okazos en la Esperanto-domo Gent la 25an de februaro ekde la 10a ĝis la 13a. Ĝia celo estas la aprobo de la regularo pri la administrantaro. Posttagmeze okazos la inaŭguro de la genta centro.

**21. Limburgo**
Envenis ĝentila letero de M. Habex informante pri la ekesto en Genk de nova klubo (Genk Esperanto Nova Klubo). La estraro demandas sin ĉu la malnova grupo ankoraŭ ekzistas.
Laŭ Roland Rotsaert FEL sugestu, ke la Limburga Esperanto-Ligo malfondiĝu ĉar ĝi kaŭzas pli da problemoj ol ĝi evitas. Wim De Smet respondos.

**22. Pariza kongreso**
La pariza kongreso estas aranĝo de UFE. Wim De Smet aliĝis. Kiugrade estas la intereso ĉe la FEL-membroj? Ni ne organizos vojaĝon antaŭ ol montriĝas, ke estas sufiĉe da partoprenantoj. Aliĝiloj haveblos ĉe FEL.

**23. Eŭropaj aferoj**
Proponon de Wim De Smet pri Esperanto senpriparole forsendis al la Eŭropa Parlamento s-ro Vandemeulebroucke.

**24. Fondaĵo Jules Verstraeten**
Nepras fari klaran distingon inter la Komisiono pri la Domo (kion fari pri la domo?) kaj la fondaĵo Jules verstraeten (kolektas monon). La regularo pri la fondaĵo Jules Verstraeten jam pritraktiĝis, sed ne de la estraro. La teksto estas akceptata per 3 voĉoj kontraŭ 1 kun 2 sindetenoj. Wim De Smet rezignis pri reprezentiĝo de FEL en la fondaĵo. Ivo Durwael akceptiĝas kiel reprezentanto de la FEL-estraro.

**25. Kunlaborantaj asocioj**
Kunlaborantaj asocioj rajtas je reprezentanto en la administrantaro post pago de kotizo (600 fr.). Ĉu ni faros escepton por la Fervojistoj? Tio malekceptiĝas (2 voĉoj por kaj 4 kontraŭ).

**26. Konduto de estraranoj**
Wim De Smet substrekas, ke la estraranoj estu lojalaj, speciale esprimante sin al la publiko/membraro.

**27. Aranĝoj de sabato la 11a de marto 1995**
Aprobiĝas la dato de la Ĝenerala Membrokunsido kun administrantarkunsido.
Du personoj de ekster la estraro estos invitataj por akiri informojn pri la financoj.
Programo:
08.30a estrarkunveno
10.00a malfermaj kunsidoj de komisionoj
12.00a panmanĝo
posttagmeze: Ĝenerala Jarkunveno + administrantarkunsido

**28. La venonta estrarkunsido** okazos sabaton la 18an de februaro je la 14.30a.

**29. Diversaĵoj**
Ne estas diversaĵoj.

La prezidanto fermas la kunsidon je la 13.09a.

Raportis Johan Van Eenoo.

---

**Komisiono pri Membraro, 95.01.21**

Kunsido de 950121, kiu okazis posttagmeze, en la salono de la Fervojistoj en Brussel-Centraal.

Partoprenis: Lucien De Sutter, Ghislain Jacobs, Katja Lödör, Ingrid Lievens.
Ĉeestis: R. Steenhout, s-ino Jacobs.

**La komisiono kunsidis** ĉefe por pridiskuti la respondojn al la demandoj 7, 9, 10 kaj 15 de la enketo pri Horizontaal. (Pri la aliaj, Ingrid Lievens jam raportis en Horizontaal.) Oni opinias, ke 38 enketiloj eble estas malmulte, sed tamen ne estas malbona rezulto. Pliaj ne necesas, do oni ne

plu telefonu al la membroj por havi pli da respondoj.
Envenis opinioj, proponoj, kritiko. Grava estas la demando pri gvidlinioj por Horizontaal. La komisiono konstatas, ke Horizontaal aperas danke al la redaktoro, kiu dediĉas multe da energio al la kompilado. Do, antaŭ ol decidiĝi, necesas kunveni kune kun la redaktoro kaj helpi lin per redakta komisiono.
Por la venonta numero oni petos la redaktoron komuniki la decidon de la estraro de FEL pri la ebleco resendi tekstojn al la verkintoj, kiuj postulas tion.
Oni ankaŭ proponas, ke kelkaj personoj provlegu la tekstojn antaŭ la aperigo.

Protokolis Ingrid Lievens.

---

**Administrantaro, 95.01.27**

Ĉeestas: Wim De Smet, Piet Glorieux, Henny De Ketelaere, Paul Peeraerts, Jules Verstraeten.
Senkulpigon petis: Katja Lödör, Ingrid Lievens kaj Ivo Durwael.
Sciigis, ke li ne venos: Roland Rotsaert.

Malfermo: 19.43a.

**La prezidanto denove** klarigas la celon de tiu ĉi kunveno. En la jenaj datoj okazis administrantaraj kunsidoj en kiuj ĉiam mankis kvorumo: 6a de novembro, 10a de decembro, 6a de januaro. Pro tio okazas nun kunsido por kiu ne necesu kvorumo. Tiu proceduro estas kutima en pluraj organizaĵoj kaj estas leĝe antaŭvidita por ĝeneralaj kunsidoj. Ivo Durwael skribis, ke li obĵetas kontraŭ tiu proceduro.
En tiu momento alvenas Jacques Schram kaj Cor van Ekelenburg.
Ĉar estas nur unu obĵeto, la ĉeestantoj unuanime voĉdonas por la regularo pri la administrantoj. Tiu decido estas konfirmenda de la venonta administrantara kunveno.

Fino de la kunveno: 20.03a.

Protokolis Paul Peeraerts.

---

**Estraro, 95.02.19**

La estrarkunsido okazinta dimanĉon la 19an de februaro 1995 en la Esperanto-Centro, Frankrijklei 140, 2000 Antverpeno.

Ĉeestis: Wim De Smet (prezidanto), Johan Van Eenoo (sekretario), Roland Rotsaert (kasisto), Ingrid Lievens (estraranino).
Pardonpetis: Alex Humet, Ivo Durwael.
Kunĉeestis: Paul Peeraerts (direktoro de la Esperanto-Centro, invitita).

La prezidanto malfermas la kunsidon je la 14.15a, bonvenigante ĉiujn ĉeestantojn.

**Tagordo**

**1. Aldoniĝas al la tagordo** punkto pri "Netwerk", kaj punkto pri la genta "Jaarbeurs". En la eron "Diversaĵoj" enŝoviĝas punkto pri la fondaĵo Vanbiervliet (Esperanto-biblioteko Kortrijk).

**2. Aprobiĝas la raporto** pri la estrarkunsido de 18.12.1994 (dua lego).

**3. Aprobiĝas kun kelkaj** rimarkoj la raporto pri la estrarkunsido de 15.01.1995. Johan Van Eenoo faros korektitan version.

**4. Aprobiĝas la raporto** pri la administrantarkunsido de 27.01.1995.

**5. Envenintaj korespondaĵoj**
a. Letero kun raporto de "La Konkordo" (Kortrijk) pri la fondaĵo Vanbiervliet, dissendita al la estraro kaj administrantaro. Irigita al "Diversaĵoj" (punkto 20).
b. S-ro "Krisantemo" (japano) sciigas, ke li planas vojaĝon trans Eŭropo, restadonta i.a. en Roterdamo, kaj pretas prezenti sian programon en lokaj grupoj. Laŭ Ingrid Lievens la grupoj de Oostende, Antwerpen, Leuven kaj Kalmthout pretas akcepti lin, se la dato konvenos.
c. Laŭtlegiĝas letero de Jef Geraerts (sekretario de LEL) i.a. pri la rekono de la grupo de Peer kiel membro de FEL. La grupo de Peer jam faris tian peton. Agnoski grupon precipe estas afero por la administrantaro. La estraro konsentas meti la rekonpeton de Peer sur la tagordon de la venonta administrantarkunsido, kun favora konsilo siaparte.
ĉ. Kopio de la gratulletero, kiun R. Wylleman sendis al s-ro M. Meadowcroft, prezidanto de la Angla Liberala Partio, pri rezolucio favora al Esperanto, kiun tiu partio en 1994 akceptis. La leteron de R. Wylleman FEL kaj la lokaj grupoj uzu kiel modelon kaj mem sendos al s-ro Meadowcroft.
d. FEL informiĝis pri kandidatiĝo por Kultura Ambasadoro de Flandrio. Montriĝis el la respondo, ke tio temas nur pri artoj, kaj ne pri kulturo ĝenerale. FEL do ne kandidatiĝos.
e. ILEI-enketo dissendita al la grupoj.
f. Invito al "Talenfeest", Brussel. Por la sekvonta estraro.
g. Letero far J. Schram pri la Esperanto-kursoj en Quellinstraat, Antverpeno, al la antverpena Skabeno pri Instruado. Wim De Smet bedaŭras - kaj la estraranoj ne kontraŭdiras tion - ke la iniciativo de J. Schram, kvankam valora, preniĝis denove sen kunligo kun FEL, malgraŭ la freŝaj intencoj pri kunlaboro.
ĝ. Letero "Talen in Europa" far iu s-ro Slabbinck aperinta en "De Morgen", favora al Esperanto kiel ideala internacian lingvo, sed preferanta tamen la anglan al Esperanto. Roland Rotsaert jam ensendis respondon, sed ĝi ne aperis. Wim De Smet bedaŭras, ke tiu letero aperis en "Horizontaal". Afero transdonita al la Komisiono pri Membraro.
h. Aperos en aprilo 1995 "Europa en de Volmaakte Taal", traduko en la nederlanda de la verko far Umberto eco, "La serĉado de la lingvo perfekta". Wim De Smet rekomendas, ke la Centro enigu stokon de tiu libro, aŭ ke almenaŭ la sekvonta estraro kaptu la okazon de la aperigo de la libro por atentigi la membraron pri ĝi.

**6. Raportoj de komisionoj**
a. La kunsido de la Komisiono pri Informado (19.02.1995 matene) ne povis okazi pro diversaj kialoj.
b. La Komisiono pri Financoj kunvenis la 13an de februaro. Roland Rotsaert pliklarigas la raporton. La ĝenerala situacio pli malpli similas al tiu de 1993. Anonciĝis kandidato-librotenisto, kiu travidos la librotenadon de FEL. Kelkaj punktoj (Internationale Jaarbeurs Vlaanderen, Fondaĵo Jules Verstraeten) transŝoviĝas al punkto 7, kaj repago de elspezoj de estraranoj al punkto 8. La estraro akceptas la aliajn proponojn kaj rimarkojn.
c. La Komisiono pri Membraro kunvenis en januaro. Ingrid Lievens pliklarigas la raporton. Pridiskutiĝis kaj jam perletere komunikiĝis al la redaktoro proponoj de kelkaj membroj pri Horizontaal (i.a. teksto ĉe fotoj, aŭtonomeco/respondeco de aŭtoroj). La komisiono:
- timas, ke tro da negativa kritiko forigos la redaktoron;
- proponas legigi la publikigontajn tekstojn al kelkaj personoj, atendante la estigon de redakcia komisiono;
- proponas organizi komisian kunvenon kun la nuna redaktoro en Gent.
Tiujn proponojn la estraro aprobas.
Wim De Smet rimarkigas, ke definitiva aranĝo pri Horizontaal ankaŭ dependas de la respondo el Nederlando pri komuna flandra-nederlanda revuo, aŭ eble flandra-valona-brusela revuo. Johan Van Eenoo proponas, ke Horizontaal havu "grupan paĝon", kiun prizorgus la grupoj, ekzemple laŭalfabete, kun teksto pri iu ajn temo.
Wim De Smet dubas pri la kunlaboro de la grupoj. La redaktoro mem pli insistu ĉe la grupoj pri kunlaboro (ekzemple pri la bruĝa tago - 06.11.1994 - nenion aperis en Horizontaal). Ingrid Lievens rememorigas pasintjaran klopodon tiusencan, sed montriĝis malalta kvalito de la tekstoj. Laŭ Roland Rotsaert la redaktoro havu iun konon pri modernaj eldonmetodoj.
Ingrid Lievens maldaŭrigis la pertelefonan enketon pri Horizontaal, ĉar la rezultoj estas nesufiĉaj. Eble estonta enketo estu farita per aparta folio en Horizontaal.
ĉ. La Komisiono pri Instruado ne rekunvenis en januaro pro malsano de R. Wylleman. Ĝi kunvenu tamen antaŭ la 11a de marto.
d. La Komisiono pri Eldonaĵoj: ne estas novaĵoj pri redakcia komisiono de "Monato". Paul Peeraerts donis liston de kandidatoj al Alex Humet.

**7. Financa stato**
- Roland Rotsaert: Havi multe da likida mono ne signifas, ke ne estas financaj problemoj. Kvankam ĉiujare estas iom pli da ekvilibro ni ne sukcesas kreskigi la

propran kapitalon. Ekstera reviziado de la librotenado ankoraŭ ne okazis. Ĝenerale la problemoj de antaŭ unu jaro estas solvitaj.
- "Netwerk". FEL jam aliĝis je unua nivelo: Krekelsparen. Duanivela aliĝo alportus tri avantaĝojn: donacon de kelkdekmiloj da frankoj kiun kutime ricevas nova aliĝinto (ni inventu ion realigendan per tiu mono), aliro al kredito, kaj la ebleco fari tra Netwerk donacojn dedukteblajn de la impostoj. La estraro aprobas jenan proceduron: ĉiu estrarano ricevu kopion de la regularo, kaj havos tri-kvar tagojn por sciigi sian opinion telefone aŭ perpoŝte. Se neniu kontraŭas, la aliĝpeto estos ensendata. Tio verŝajne estas afero de la venonta estraro.
- Propono far La Progreso pri partopreno de FEL en la "Internationale Jaarbeurs van Vlaanderen" (Gent). La estraro decidas preni decidon hodiaŭ (3 por, 1 kontraŭ).
1) Standmaterialo: Antaŭ kelkaj jaroj la estraro decidis aĉeti standmaterialon, sed por manko da mono la aĉeto ĉiujare prokrastiĝis. Laŭ Roland Rotsaert nun ja estas mono por tio. La Komisiono pri Informado pristudos la aĉeton kaj faros proponon. La venonta estraro decidu pri la plenumo de la aĉeto.
2) La estraro favore principdecidas (2 por, 1 kontraŭ, 1 sindetenas), ke FEL prenos sur sin la kostojn laŭ la fakturo (ĝis maksimume 52.000 fr.) pri la punkto A de la buĝeto, kiun La Progreso faris. Pri la praktika flanko la venonta estraro decidu.
- Fondaĵo Jules Verstraeten. La estraro konfirmas la proponon de la financa komisiono disponigi 75.000 fr. en la fondaĵon Jules Verstraeten, laŭ la 1/4-3/4-principo kaj ĉar La Verda Stelo kontribuis 25.000 fr.
- La estraro aprobas la proponon de la financa komisiono disponigi 5.000 fr. por parte kovri elspezojn de festeto por la laborantoj de la centro.

**8. Kostoj de estraranoj kaj administrantoj**
La estraro unuanime interkonsentas pridecidi la unuan alineon (komplete repageblaj kostoj) de la propono de la financa komisiono (vidu raporton).
La estraro:
- akceptas la principon, ke dungitoj certe ne havu proprajn kostojn sekve de funkciado de FEL ekster la centro kaj ke tiaj kostoj estas repageblaj. Tamen ĝi aldonas, ke tio estu pli klare specifata en la estonteco.
- interkonsentas, ke tiuj kiuj, okaze de Ĝenerala Jarkunveno, jam matene ĉeestas, ricevos, kiel simbolan rekompencon, senpagan trinkaĵon kaj tagmanĝon.
- kostoj de afranko kaj telefonado, telekopiado ktp sendiskute estas repageblaj. Repago okazos postpete sur propran bank/poŝtkonton, konton ĉe FEL aŭ enmane.
La estraro interkonsentas (3 por, 1 sin detenas), ke la venonta estraro pridecidu la kromajn, proporcie repageblajn kostojn.

**9. Perspektivoj por FEL-agado en 1995**
La venonta estraro certe komencos sian agadon en pli favoraj cirkonstancoj ol la nuna. Jam kelkajn punktojn, pri kiuj la nuna estraro ne decidis, ĝi povas sur sian tagordon (genta borso, repago de kostoj, subvencioj ktp).
La nuna estraro favoras kunlaboron kun la reorganizita nederlanda Esperanto-asocio. La situacio pri Monato stagnas.

**10. Kandidatoj por estrarfunkcioj**
Ingrid Lievens kandidatiĝis kiel administrantino. Katja Lödör estos administrantino de La Progreso.
Johan Van Eenoo ankoraŭ ne estas indikita kiel administranto de Paco kaj Justeco (kunveno 09.03.1995).
Roland Rotsaert preferas esti simpla membro, eble membro de komisiono.
Wim De Smet laŭdas la laboron de la estraranoj, speciale la novajn, kaj invitas ilin serĉi kandidatojn por estraro kaj administrantaro. Li opinias, ke estos pli facile, se prezidanto, sekretario kaj kasisto loĝu en la regiono de Antverpeno aŭ almenaŭ havu faksaparaton.

**12. Peto de BEF; eŭroparlamentanoj, lingvoinstruado**
La enveninta letero estos transsendata al R. Wylleman, ĉar en ties enketo troviĝas la sama demando kiel en la letero.

**13. Preparo de administrantarkunsido 25.02.1995**
Johan Van Eenoo dubas, ĉu li povos ĉeesti.





**14. Funkciado de la Esperanto-centro en januaro 1995**
Paul Peeraerts donas mallongan superrigardon pri la aktivecoj de la centro en januaro 1995.
La financa komisiono faru raporton pri la librotenado kaj la financoj de FEL.

**15. Regularpropono pri lokaj grupoj: amendoj**
Roland Rotsaert sin detenas ĉe la voĉdonado pri la regularoj.
La regularpropono estos submetata (3 por, 1 sin detenas) al venonta administrantarkunsido kun kelkaj adaptoj:
- Ligo konsistas el du grupoj.
- 9: je la unua de januaro de la sekvonta jaro ...
- 11a: se ĝia membraro mem dum kunsido decidas ...
- 11: a-b (du fojojn a)
- 12: organizitan
En la teksto ni havas du fojojn punkton 11. La ciferoj de la sekvantaj punktoj estas adaptataj: 11-12-13.

**16. Regularo pri estraro: amendoj**
- 1: en la lasta frazo de la lasta alineo anstataŭiĝas "prezidanton aŭ se necese provizoran prezidanton" per "provizoran prezidanton". gia-ĝia.
- 4: La mandato de la estraro estas de unu jaro kaj ĝi daŭras ...
- ĝ: aldoni: "kiu devas reprezenti duonon de la estraro".
- eroj post ĝ estas h kaj ĥ.
Submetota al la venonta administrantarkunveno (3 por, 1 sin detenas).

**17. Regularo pri estrarelektoj: amendoj**
- b3: ricevu.
- e: (elektado): 2 (normala proceduro): ... ne atingas tiun de la interkonsentita nombro ... daŭrigi la elekton sed maksimume du fojojn.
- aldoniĝas postteksa ero: "Eblaj protestoj kontraŭ la elektoj devas esti skribe farataj ene de du semajnoj post la elektodato kaj esti sendataj al la direktoro de la Esperanto-centro. Ene de unu monato la administrantaro devas esti kunvokata por decidi pri la valoro de la protesto kaj konkludi pri ĝi."
Submetota al la venonta administrantarkunsido (3 por, 1 sin detenas).

**18. Regularo pri la Esperanto-domo: amendoj**
Paul Peeraerts timas, ke tia regularo malfaciligos kaj komplikos la funkciadon de la Esperanto-centro.
La estraro decidas submeti ĝin al la venonta administrantarkunsido kaj forŝovas la aferon al la elektota estraro.

**19. Preparoj por la kunsidoj de 11.03.1995**
La lokaj grupoj sciigu al la sekretario nomon kaj adreson de sia(j) reprezentonto(j) en la administrantarkunsido. Krome estas la normala proceduro.

**20. Diversaĵoj**
Fondaĵo Vanbiervliet: Malgraŭ la graveco kaj akuteco de la situacio en Kortrijk, la afero metiĝis sub "Diversaĵoj" tute je la fino de la kunsido. Restis do malmulte da tempo por pritrakti ĝin. La grupo de Kortrijk faris klaran raporton en kiu ĝi priskribas la situacion kaj petas urĝan eksolvon de la problemo.
Roland Rotsaert tra Monato kaj aliaj revuoj kontaktos aliajn Esperanto-librejojn pri kiamaniere biblioteki.

La estrarkunsido fermiĝas je la 19.10a.

Raportis Johan Van Eenoo.

---

**Konsilantaro de la Fondaĵo Jules Verstraeten, 95.03.03**

Kunveno je vendredo, la 3a de marto 1995 en la Esperanto-centro.

Ĉeestis: Jules Verstraeten, Jacques Schram kaj Cor van Ekelenburg (La Verda Stelo), Paul Peeraerts (Esperanto-centro), Ivo Durwael (FEL).
Komenco: 19.00
Fino: 19.15

**Celo de la kunveno**
La Verda Stelo mendis farbadon de la kunvensalono kaj de la kuirejo ĉe "De Ploeg".
Ili pretas fari tion por 87.000 fr. Ĉu la fondaĵo Jules Verstraeten pagu tion?

**La konsilantoj opinias,** ke tiuj laboroj kongruas kun la celoj de la fondaĵo. Jacques Schram opinias, ke, se la fondaĵo sisteme pagus ĉiujn renovigojn, tio povus konduki al facilanimaj decidoj. Tial li proponas, ke la inicianta instanco (do La Verda Stelo aŭ FEL) ankaŭ partoprenu en la elspezoj. Li proponas, ke ĉi-okaze La Verda Stelo pagu la duonon de la elspezoj kaj la fondaĵo la alian duonon. Al la fakturo de "De Ploeg" aldoniĝos ankoraŭ pliaj elspezoj por novaj kurtenoj kaj drapiraĵoj. La taksita sumo de ĉiuj elspezoj estas proksimume 100.000 fr.
La konsilantoj unuanime decidas, ke la fondaĵo Jules Verstraeten do pagos la duonon de la elspezoj por la renovigo de la salonoj de La Verda Stelo, ĝis maksimume 50.000 fr.

Tiu ĉi decido estu aprobita de la estraroj de La Verda Stelo kaj de FEL.

Protokolis Ivo Durwael.

---

**Administrantaro, 95.03.11**

La administrantarkunsido okazinta la 11an de marto 1995 en la Esperanto-Centro, Frankrijklei 140, 2000 Antverpeno.

Ĉeestas: Wim De Smet (prezidanto), Alex Humet (vicprezidanto), Johan Van Eenoo (sekretario), Roland Rotsaert (kasisto), Ingrid Lievens, Paul Peeraerts, Ivo Durwael, Jules Verstraeten, Edward Symoens, Katja Lödör, Jef Geraerts, Piet Glorieux, Henny De Ketelaere.
Neniu uzis la rajton transdoni sian voĉdonrajton.
Kelkaj administrantoj malfruis; tial la nombro de voĉoj varias en la raporto.

La prezidanto malfermas la kunsidon je la 11a horo bonvenigante ĉiujn, kaj konstatante, ke la voĉdonkvorumo estas atingita.

**Tagordo**

**1. Regularo pri la komisionoj**
Pliklariĝas, post demando de Jef Geraerts, ke la administrantaro, kiel la plej alta decidinstanco de FEL, rajtas ŝanĝi regularon per si mem, se tiu estas kontraŭleĝa.
Akceptiĝas la regularo pri la FEL-komisionoj (11 por, 0 kontraŭ, 1 sin detenas).

**2. Regularo pri la FEL-estraro**
Akceptiĝas la regularo pri la FEL-estraro (10 por, 0 kontraŭ, 1 sin detenas) post pliklarigo far Wim De Smet, kaj kun la jenaj adaptoj:
art. 1, alineo 2: ... en tiu speciala kazo la administrantaro elektas por tiu periodo nur *provizoran* prezidanton.
art. 4, a: La mandato de la estraro *estas de unu jaro kaj* daŭras principe ĝis la elekto de nova estraro.

**3. Regularo pri lokaj grupoj**
Aprobiĝas la regularo pri lokaj grupoj (9 por, 3 kontraŭ, 2 sin detenas) post aldono de punkto f en art. 8 (12 por, 0 kontraŭ, 2 sin detenas):
*8. Grupo povas esti eksigata el FEL en unu el jenaj cirkonstancoj:*
*(...)*
*f. Se ĝia membronombro malkreskas sub 5.*
Interkonsentiĝas, ke la administrantaro rajtas fari esceptojn sur la regularo.

**4. Administrantaro 25.02.1995**
Unuanime aprobiĝas la raporto pri la administrantarkunsido okazinta en la nova sidejo de La Progreso en Gent, la 25an de februaro 1995.

**5. Perspektivoj pri la konsistigota administrantaro**
La administrantaro antaŭvidas problemon pri la "papera estrarano el Antverpeno". Pro subvencia kialo tri FEL-estraranoj devas loĝi en la provinco Antverpeno. Ĉu estos kandidato? Gerd Jacques proponas pligrandigi la estraron.

**6. Perspektivoj pri la elektota estraro**
Johan Van Eenoo laŭtlegas la liston de la kandidatoj: Ivo Durwael (kandidato por prezidanteco), Wim De Smet, Flory Witdoeckt, Walter Vandekieboom, Johan Van Eenoo.
Ĉar eblas, ke Wim De Smet post kelka tempo foriros al evolulando, necesas 6a estraran(in)o.
Gekandidatoj restas bonvenaj. Nur kiel orientiĝo ĉiu kandidato iom pliklarigas sian kandidatiĝon.

**7. Diversaĵoj**
Wim De Smet donas superrigardon pri la posttagmeza programo, kiu komenciĝos je la 14.30a kaj finiĝos laŭespere per la elektado de nova estraro.
Wim De Smet pliklarigas pri la afero "Sonorilo". Kontraŭe al la interkonsento dum pasinta kunveno, la nova direktoro de "Sonorilo", s-ro P. De Schepper, ne faris inventaron. Li kondukigis la tutan stokon al Grégoire Maertens en Bruĝo.

La prezidanto Wim De Smet fermas la administrantarkunsidon je la 14.30a dezirante bonan apetiton al ĉiuj ĉeestintoj.

Raportis Johan Van Eenoo.

---

**Ĝenerala Membrokunsido, 95.03.11**

La laŭstatuta Ĝenerala Membrokunsido okazinta la 11an de marto 1995 en la Esperanto-domo, Frankrijklei 140, 2000 Antverpeno.

La prezidanto Wim De Smet malfermas la kunsidon je la 14.30a bonvenigante ĉiujn partoprenantojn, speciale la ĉeestantojn el Nederlando, i.a. la prezidantinon de Esperanto Nederland s-inon Bakker.
Anonciĝis poste, ke s-ro Edward Symoens retiriĝos el la administrantaro de FEL. Ankaŭ Alex Humet ne plu estas kandidato por la administrantaro.

**Tagordo**

**1. Sekretaria raporto**
Wim De Smet laŭtlegas naŭpaĝan raporton retrorigardantan la pasintan laborjaron.
- La financoj estas en ekvilibro, eĉ estas profito je 5.500 fr., kontraŭe al la malprofito 1993a.
- La vivon de la asocio klare influis ŝparemo. La agado pli ol antaŭe dependis de iniciativoj el lokaj kaj el internaciaj grupoj. Tiom Wim De Smet ilustras per superrigardo de la pasintjaraj FEL-aktivecoj.
- La estraro bone funkciis malgraŭ kelkaj malinterkonsentoj, sed pro malagrablaj spertoj kiel prezidanto dum la pasinta jaro, Wim De Smet ne plu kandidatiĝas kiel prezidanto por la nova laborjaro.

**2. Raporto pri lokaj grupoj**
La estrarino Ingrid Lievens laŭtlegas raporton pri la lokaj grupoj, nekompletan pro tio, ke kelkaj grupoj ne ensendis sian raporton. Pri tiuj grupoj (La Verda Stelo, Esperanto 2000, Paco kaj Justeco, La Konkordo kaj La Konko) la reprezentanto donas parolan raporton surloke.
La estraro alvokas la grupojn ensendi ĝustatempe sian raporton sekvontjaran.

**3. Financa stato**
La kasisto Roland Rotsaert pliklarigas la financan staton helpe de alĉeestante disdonita bilanco. Montriĝas, ke malgraŭ la profito la problemoj ne estas solvitaj. Krom en la aĉeto de afrankmaŝino apenaŭ investiĝis mono en novaj materialoj, plibeligo de la domo, reklamo ktp. La ĉi-jaran profiton ni ĉefe dankas al la ŝparemo, ne al novaj investoj.
S-ro Declerck konfirmas, ke la librotenado estas en ordo.

**4. Esperanto-centro**
La direktoro Paul Peeraerts parole skizas la situacion de la Esperanto-centro. Laboras en ĝi sep oficistoj kaj du volontuloj. Pro ŝparemo maldungiĝis du personoj. Dek du libroj estis prilaboritaj, jam aperis kvar. La libroservo bone funkcias. 1956 leteroj redaktiĝis dum la jaro. La eldono de Monato kaj de libroj, kaj la butiko teretaĝa konsistigas la ĉefajn enspezojn de la centro. Krom la afrankmaŝino ne estis gravaj aĉetoj.
Wim De Smet dankas pro la raportoj kaj la pliklarigoj.

**5. Rimarkoj kaj opinioj de la membroj**
Guido Van Damme havas du demandojn al Wim De Smet:
1. Ĉu videblas en Flandrio progreso pri Esperanto (ĉu kresko de la membraro, ĉu ni sufiĉe zorgas pri la novuloj, Esperanto en lernejoj)?
2. Laŭ Wim De Smet la eldonado de Monato ne estas tasko de FEL. Kial ne?
La demando pri Monato ekscitas emo-

kunsido. Tiun decidon Wim De Smet tuj akceptas

**3. Estrarelekto**
Ivo Durwael insistas, ke la elektoprezidanto estu pli bone preparita. Pasintfoje nur dum la administrantarkunsido montriĝis, ke Roland Rotsaert ne kandidatiĝus kiel estrarano, kaj konsekvence estus la elektoprezidanto vole ne vole.
Krome la elektokunsido estu malfermita ankaŭ al ne-administrantoj. Tiuj havus nur ĉeestrajton, sed nek parolrajton nek voĉdonrajton.

**4. Diversaĵoj**
a. La 1an de aprilo okazos kunsido en la urba biblioteko Kortrijk sub instigo de Piet Glorieux (La Konkordo). Temos pri la estonteco de la fondaĵo Vanbiervliet.
b. Reprezentantino por La Verda Stelo en "Culturele Raad van de Stad Antwerpen" estos Henny De Ketelaere; Ivo Durwael petos Alex Humet reprezenti FEL. Se Alex rifuzus, Ivo Durwael serĉos iun alian.
c. Wim De Smet estos la reprezentanto de FEL en "Cultuurraad van de Provincie Antwerpen".
ĉ. La estraro pro neŭtralecprincipo decidas ne partopreni en la PVDA-iniciativo "Objectief".

La prezidanto fermas la estrarkunsidon je la 22.07a. La sekvonta kunsido okazos la 17an de aprilo de la 15.00a ĝis la 18.00a en la Esperanto-centro, Antwerpen.

Raportis Johan Van Eenoo

---

**Organigramo - aldono**

**Komisionoj de FEL**

Komisiono pri Financoj
Flory Witdoeckt
Gerd Jacques
Paul Peeraerts
Roland Rotsaert

Komisiono pri la Esperanto-Domo
Ivo Durwael
Paul Peeraerts
Jacques Schram
Cor van Ekelenbrug

Komisiono pri Instruado
Henny De Ketelaere
Wim De Smet
Raymond Wylleman

Komisiono pri Interna Agado
Marc Cuffez
Ingrid Lievens
Katja Lödör

Komisiono pri Eksteraj Rilatoj
Ivo Durwael
Frans Croon
Paul Peeraerts
Roland Rotsaert

Komisiono pri Eŭropa Agado
Wim De Smet
Edward Symoens
Kiki Tytgat
Walter Vandekieboom
Flory Witdoeckt

Komisiono pri Informado
Ivo Durwael
Annie Bollaert
Germain Pirlot
Eddy Raats

**Aliaj Komisionoj**

Redakta Komisiono de Monato
Paul Peeraerts
Philippe Cousson
Mark Fettes
Alex Humet
Eddy Raats
Anne Tilmont

Konsilantaro Fondaĵo Jules Verstraeten
Jules Verstraeten
Ivo Durwael
Paul Peeraerts
Jacques Schram
Cor van Ekelenburg





## Esperanto-biblioteko "Fondaĵo Vanbiervliet", Kortrijk, Belgio

*Post la forpaso de César Vanbiervliet kaj Jan Hanssens, la fondaĵo dum du-tri jaroj apenaŭ funkciis, kvankam daŭre envenis novaj libroj kaj revuoj. Ĉar estis la risko, ke la biblioteko silente pereos, mi antaŭ kelkaj monatoj decidis fari alvokon por kunigi skipon da volontuloj, kiuj povos reaktivigi la fondaĵon. Ĝis nun estas trovita nur manpleno da helpantoj, sed la enhavo de la amasiĝintaj sakoj kaj skatoloj jam estas pli malpli ordigita. Kvankam Kortrijk ne vere troviĝas apud mia loĝejo, mi intencas aktivi ĝis kiam la fondaĵo denove kapablas memstare funkcii.*

*Mi memorigu, ke la fondaĵo disponas pri ejo en la urba biblioteko de Kortrijk, kiu ankaŭ havigas iom da teknika helpo. Tamen, la praktikan laboron devas fari volontuloj-movadanoj. La biblioteko ne havas proprajn monrimedojn; do ne eblis akcepti la proponojn, kiuj venis el kelkaj foraj landoj de personoj kiuj pretis volontuli kontraŭ repago de vojaĝkostoj kaj poŝmono. La helpo venu de personoj el la regiono aŭ de aliaj, kiuj kapablas mem prizorgi sian vojaĝon kaj restadon.*

*La nuna eta skipo verŝajne sukcesos ĝis la fino de 1995 provizore reordigi la kolekton. Poste venos la vera biblioteka laboro: registri la librojn kaj revuojn kiuj alvenis dum la lastaj jaroj, registri la paperan sliparon en komputilon, restarigi kontaktojn kun la aliaj bibliotekoj, kaj, ĝenerale, garantii normalan funkciadon kun fidinda horaro kaj akurata administrado.*

*Momente mi esploras la eblojn de elektronika katalogado de la fondaĵo. La urba biblioteko proponis uzi la programon CDS-ISIS, pri kiu jam estas sperto en la biblioteko. Tiu propono ŝajnas esti nerifuzebla. Ankaŭ el strategio vidpunkto la uzo de CDS-ISIS povas esti oportuna, car ĝi estas senpage disponigita de Unesco: jen finfine ebleco por utile uzi niajn rilatojn kun Unesco!*

*Problemo estas, ke malmultas la informoj pri CDS-ISIS. La bibliotekistoj de Kortrijk tre entuziasmas pri ĝi. Ekzistas aktiva grupo de uzantoj (pri kiu mi baldaŭ esperas havi pli da informoj). Ŝajnas, ke la flandra registaro intencas ekuzi ĝin por katalogi la internaciajn traktatojn. Aliflanke, aliaj flandraj bibliotekoj tute ne konas ĝin. En Esperantujo mi nur konas unu uzinton: la iama Terminologia Centro de UEA (TEC), kiu nur mallongtempe funkciis pro la interna milito en Jugoslavio. La opinio de eks-TECkunlaboranto estas sufice malfavora. Aliflanke, oni asertas, ke la programo dum la pasintaj 5 jaroj multe pliboniĝis.*

*Konsiderante, ke unuflanke, Fondaĵo Vanbiervliet kvazaŭ devas uzi CDS-ISIS, kaj ke aliflanke, laŭ ĝis nun akiritaj informoj, nur 2 E-bibliotekoj havas elektronikan katalogon (Aalen kaj San Pablo de Ordal), mi havas jenajn demandojn:*
*- ĉu CDS-ISIS estas de sufice da spertuloj konsiderata kiel taŭga biblioteka programo?*

*- ĉu bibliotekoj, kiuj jam havas elektronikan katalogon kapablas interŝanĝi informojn kun CDS-ISIS (kaj eble pretas transiri al CDS-ISIS)? (Se eblas al dBase, verŝajne ankaŭ eblas al CDS-ISIS.)*
*- ĉu bibliotekoj kun "papera" katalogo havas planojn por aŭtomatigi ĝin kaj pretas konsideri CDS-ISIS?*

*Se la opinioj pri CDS-ISIS estus ĝenerale pozitivaj, tio estus ideala solvo. Ekzistas internacie akceptataj registradmetodoj por CDS-ISIS, ekzistas la teknikaj rimedoj por malmultekoste produkti CD-ROM (imagu, ke haveblus disko kun la kolektoj de ĉiuj E-bibliotekoj, je prezo de eble 100 USD!), E-eldonejoj povus jam en siaj presaĵoj antaŭvidi la bazajn informojn por katalogado ...*

*Por via informo mi citas erojn el tri leteroj, kiujn mi ĝis nun ricevis de E-bibliotekoj:*

*UEA - Biblioteko Hodler*
*... Antaŭ du-tri jaroj, kiam ni serioze ekpensis pri enkomputiligo de nia biblioteko, laŭ invito de UEA okazis kelkaj kunsidoj de profesiaj bibliotekistoj kaj reprezentantoj de Esperanto-bibliotekoj. Unu el la celoj estis interkonsenti pri sama biblioteka programo, kiun oni apliku ĉie ... Ĉio tio restis revo, ĉar ĉiu kunsido produktis nur grandan malkonsenton pri la plej uzinda programo ...*

*Aalen (Ottmár Járeb)*
*Unu el miaj pripensoj estas, ke mi aldonos al la jam ekzistanta programo PCE2 (la katalogprogramo por la E-biblioteko en Aalen) ankaŭ la eblecon kopii elektitajn bibliografiajn unuojn en alian dosieron, kaj ebligi la selekton de diversaj katalogoj por legi kaj serĉi. Tielmaniere oni povus utiligi la datumaron de Aalen por krei tutan propran katalogon sen aĉeto de alia programo. Memkompreneble la datumaro estas prilaborebla ankaŭ per aliaj programoj, kaj estas uzeblaj aliaj katalogprogramoj ... Ĉu indas fari specialan programon aŭ ne, kiun jam ekzistantan programon oni povus uzi?*

*Hispana Esperanto-Muzeo*
*... Mi proponas viziti Sant Pau kaj propraokule konstati kiamaniere funkcias mia katalogado ... Mian programon preparis mia filo, sufiĉe sperta pri informatiko. Mi posedas katalogojn pri:*
*a) libroj - aŭtoroj - titoloj: ambaŭ mi povas listigi laŭ bretoj, temoj, eldonurboj ktp.*
*b) periodaĵoj: 7000 gazetoj en aŭ pri Esperanto, laŭ lando, urbo, faro, kiom estas en la muzeo, mankolisto ...*

*Bonvolu pristudi kaj diskonigi ĉi tiun tekston kaj peti opiniojn de fakuloj el via regiono. Mi esperas jam antaŭ (aŭ dum) la UK ricevi kelkaj utilajn informojn, tiel ke eblas organizi iun neformalan kunvenon dum la UK. Okazos lasta antaŭkongresa kunveno en la biblioteko (Auditorium, Leiestraat 30) je sabato, 15 julio, 9a horo. Eble utilas peti konfirmon de tiu dato de J.P. Allewaert, 056-200796.*

*Roland Rotsaert.*